

RNDr. E. Wohlgemuth: PROTEKTATA NATURMEDIO DE BRNO KAJ ĈIRKAŬAĴO

La urbo Brno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas situata en limo de du kontrastaj pejzaĝaj regionoj. Unue tio estas la montetaro *Českomoravská vrchovina* kaj *Drahanská vrchovina*. Due tio estas la malaltaĵa pejzaĝo sude de Brno, nomata *Dyjskosvratecký úval*.

Sekve de tio estas la naturo en la ĉirkaŭaĵo de Brno tre varia. Respektive oni devas diri: **estis**. Malbonigado de la naturmedio la naturon de Brno kaj ĝian ĉirkaŭaĵon tre influis. En multaj lokoj la naturo tiel dire malaperis, - ofte jam nur memorantoj povas rakonti pri ĝi. Sed tamen en Brno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo konserviĝis relative granda nombro de lokoj, kiuj estas tre interesaj kaj estas la restoj de origina naturo.

En regionoj de montetaroj estas interesaj arbaraj lokoj. Ekzemple *Mniší hora* en *Bystrc*, *Mahenova stráž* apud la rivero *Svratka* sude de la ekspoziciejo. *Velká Klajdovka* apud *Líšeň*, *Jelení žlíbek* okcidente de la valbaraĵo, *Černovický hájek* en la suda parto de Brno, *Bosonožský hájek*, *Údolí kohoutovického potoka* ktp. Ekstere de la teritorio de la urbo estas pluaj lokoj, ekzemple *Babí lom* norde de Brno, *Střelický les* en la valo de la rivereto *Bobrava* kaj aliaj. En Brno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo oni trovas ankaŭ la lokojn de stepa tipo. La plej konata estas *Stránská skála*, plue proksime estas *Bílá hora*. Similaj lokoj de ĉi tiu tipo estas *Medlánecké kopce* kaj *Netopýrky* inter la úrbaj partoj *Medlánky* kaj *Bystrc*. Inter botanikistoj estas tre konata *Občanská stráž*.

Proksime de Brno oni trovas ankaŭ karstajn fenomenojn. Ĝis la nordoriento de Brno tuŝas la *Moravia Karsto* kaj jam iom da kilometroj de Brno estas kavoj. Konataj estas *Pekárna* kaj *Ochozká jeskyně*.

Estas ankaŭ akvaj lokoj. En la suda parto de la urbo estas du mortaj branĉoj (*Holásecká jezera* kaj *Splavisko*), kiuj estas restoj de la reto de riveraj branĉoj ĉe enfluo de *Svitava* en *Svratka*'n. En ĉi tiu parto estas malgranda marĉlageto *Rájecká tuň*. Kaj ankaŭ iuj el fiŝlagoj estas tre interesaj, ekzemple *Žebětinský rybník*, *Soběšické rybníčky*, *Jezírka* sur la monteto *Holedná*, *Selše* apud *Ostopovice* kaj aliaj. Interesaj estas ankaŭ riveretoj, ekzemple la rivereto sub la arbareto *Borky*, *Ivanovický potok*, *Dvorský potok* kaj aliaj. La resto de marĉaj plataĵoj en la valo de la rivereto *Bobrava* estas *Střelická bažinka*. Simila estas *Březinská bažinka* en la rondvalo de *Tišnov*.

Ĉiuj tiuj interesaj lokoj meritas protekton. Iuj de ili jam estas deklaritaj kiel protektataj naturaj kreaĵoj.